



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 1-a de Julio 2019

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Ŝlomo Ŝaĥar, Matilda Landaŭ, Gabi Zeevi.

Gastoj: Lea Kudevitzki, Nava Bilitzki, Amos Ŝapira.

Protokolo de la pasinta kunsido estas en la retejo?

<http://esperanto.org.il/dosieroj/ELIEP201906.pdf>

1. Raportoj

- a) Salutanto en Lahti: Jehuda Miklaf. Ĉi-jare ni ne havas apartan mesaĝon, do li mem elpensu la saluton (Amri helpas).
- b) La Landa Kunveno estis sukcesa malgraŭ la malgranda ĉambro (pli ol 35 partoprenantoj). Amri sendis raporton al la membroj.
- c) Lea volontiĝis esti respondeca pri la raportado pri la landaj kunvenoj, inkluzive la fotojn.

2. IK-21 (Nava)

- a) Por 2020 estis proponitaj: la junulargastejo Bnei Dan en TA, aŭ tiu simila en Petaĥ Tikva. Nava Bilitzki, kiu prizorgos, konsulte kun Amri elektis Tel Avivon, pro kelkaj kialoj. Ni mendas 10 ĉambrojn (multaj el la ĉirkaŭaĵo volas dormi hejme), 2 noktojn, du matenmanĝojn, unu vespermanĝon. Verŝajne tio kostos 1216 NIS por paro, aŭ ĉ. 650 sikloj por unuopulo. La prezoferto ne estas ankoraŭ papere fiksita. Ŝi daŭrigos la esplorojn pri la diversaj datoj (en la sama sezono) kaj prezoj. La eblaj datoj: 2-4/4/2020, aŭ 9-11/4 – unu semajno antaŭ Pasko. *Voĉdono: ni unuanime rajtigas Nava (unu per telefono) esplori!*
- b) La proksimeco geografie al la landocentro, kaj tempe al la kursoj - estas bona okazo por venigi la kurs-finintojn: ni aktive varbu ilin!
- c) Amri varbos dum BET (Litovio) kaj la UK (Finnlando).
- ĉ) Ni devos prepari en la programo ion interesan, allogan - por la komencantoj.
- d) Eblaj lokoj por viziti: kvartalo de la Templaroj, Antipatros, Tel Kasila, pluaj promenadoj.

3. Oficejo (Ŝlomo)

Ŝlomo trovis interesan oferton – 17 m por 340 mil NIS (440 mil entute) en Begin vojo 150 (apud Azrieli turoj). Se ili havas kunsidejon de almenaŭ 30 m – tio estas esplorinda. Ni bezonos prunton de 20-40 mil, sed tio povus veni eĉ de la membroj.

4. Dratverejo (Jehoŝua, Ŝlomo kaj Amos)

- a) Amri kaj Amos subskribis ĉe la adv. Dr-o Modan la necesajn deklarojn por komenci la evakuadon (צו פינוי). Ŝlomo prizorgos tion en la juĝejo en Tel Aviv.
- b) Jehoŝua ne sukcesis paroli pli kun la luanto post la unu sola fojo en majo.
- c) Ne sukcesis la provoj malkonekti la elektron kaj la akvon.
- ĉ) Paralele, Ŝlomo provas enkasigi la nekovritajn ĉekojn per la ekzekucia instanco (הוצאה לפועל)

2/...

**5. Financoj** (Ŝlomo)

- a) Ŝlomo respondis al la registristo pri la repago de vojaĝelspezoj. (Cetere, iom malaltiĝis).
- b) Financa raporto pri la dua kvarono de 2019.
- c) Ŝlomo ne povis prezenti la aferojn al la Estraro, ĉar li ricevis kont-eltiron de UEA nur nun.
- ĉ) Pro la UEA-membreco Jehoŝua apenaŭ kolektas membrokotizojn. Ŝlomo pretas enkasigi la membrokotizojn, - kiel praktike fari tion? (poŝte, telephone, dum la LK...).

6. Israela E-isto (Mikaelo, Amri)

- a) IE-167 ankoraŭ ne estas enretigita. Amri jam delonge sendis ĝin al Dror en taŭga formato (PDF-dosiero), kvankam kun preseja ordo de la paĝoj (sed prefere ol nenio).
- b) La presita IE 167 estis disdonita dum la LK.
- c) Mikaelo preparis kovertojn kun IE 166+167 por disdoni en BET (Baltaj E-o Tagoj). Amri kunportos ilin.
- ĉ) Jehoŝua trakribis la adresaron kaj forstrekiis multajn nepagantajn abonintojn. Sekve restis granda superflua stoko de IE-167, ĉar estis represitaj 70 ekz. laŭ la antaŭa decido. Amri provos uzi parton eksterlande por varbi.
- d) Mikaelo – helpe de Lea - dissendis fine ĉion. *La Estraro esprimas sian dankon al Lea por la granda helpo!*

7. UEA kotiz-reformo (Jehoŝua)

- a) Jehoŝua klopodas plenumi la 15 lokojn, kiujn la Ĝenerala Direktoro Martin Schaeffer ofertis al ELI kiel subtenon (helpe de Fondaĵo Canuto) por membriĝi kiel MB (=Membro Baza), laŭ la 4-a, anstataŭ la 5-a kategorio. Tamen, kelkaj ĝisnunaj delegitoj decidis ne remembriĝi.
- b) Indas formuli mesaĝon pri tio, por la nova Estraro kaj ev-e ankaŭ la Komitato, en Lahti.
- c) Dek homoj pagis. Jehoŝua ankoraŭ *NE* sendis la monon al UEA.

La venonta kunsido: 2-a de Septembro 2019, 19:30

Protokolis: Gabi Zeevi